



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 6

Junio, 2015

Kara Leganto, proksimiĝas (laŭ usona kalendaro) somero, kvankam por mi tiu ĉi sezono jam komenciĝas la 1an de Junio, tio estas pli logike.

Tute hazarde la maja kunsido koincidis kun la Tago de Sendependeco de Kartvelio kaj la Tago de la kartvela lingvo. La materialon helpis kolekti kaj aranĝi s-no Laŝa Ĉaĥunaŝvili. Dankon. Ankaŭ dum la lasta kunsido de nia E-societo sin prezentis d-ro (kemio) Gary Miracle. Bonvenon al nia E-societo.

Alloke, al la sekvanta UK en Lillo jam aliĝis pli ol 2400 gesamideanoj.

–La Redakcio

Ŝota Rustaveli (1172-1216)



Ŝota Rustaveli naskiĝis en Rustavi (Kartvelio) kaj mortis en Jerusalemo. Li estis grava kartvela poeto kaj estas konsiderata unu el la plej grandaj reprezentantoj de la mezepoka literaturo. Ŝota Rustaveli aŭtoris “La kavaliro en panterfelo”-n (kartvele *Vepĥistq’aosani*). Malmulto

estas certa pri la vivo de Ŝ. Rustaveli. Laŭ la klasika, kvazaŭ legenda, historio Ŝota Rustaveli orfiĝis dum sia infanaĝo kaj estis zorgita de sia onklo, kiu estis monaĥo. Tiu frue enkondukis Ŝota-n al la religia afero, kio forte influis lin en lia verkado. Estas multe da historioj pri la edukado kaj postaj vojaĝoj de Ŝota al Arabujo, Bizanco kaj Grekujo. Oni diras, ke li iris al Jerusalemo, kiam maljuniĝis, kaj tie mortis en kartvela monaĥejo. Fakte en la Monaĥejo de la Kruco, en Jerusalemo, ekzistas fresko, kiu reprezentas, laŭ akademia konsidero, figuron de maljuna Ŝota Rustaveli. Alia historio ankaŭ rakontas, ke li verkis multe da poemoj por la reĝino Tamaro de Kartvelio, kiu regis dum la 12-a jarcento, kiam Kartvelio atingis sian oran epokon, montrante grandegan povon kaj influon. Kiel premion reĝino Tamaro donis al li la titolon de kasisto de la korto, kaj tiam Ŝota Rustaveli estus enamiĝinta pro la reĝino.

La verkoj de Ŝota Rustaveli estas tre ofte religiaj kaj filozofiaj pro la influo de religio en sia vivo. Krom tiaj poemoj, li ankaŭ verkis la grandiozan eposon “La kavaliro en panterfelo”, kiu iĝis nacia eposo de Kartvelio. Lia verkaro estas gravega por la mezepoka literaturo, tamen precipe por la kartvela literaturo, ĉar Ŝota Rustaveli estas konsiderata bazo de la literatura moro de tiu lando.

Rustaveli kaj Esperanto



Antaŭ ĉio ni volus respondi demandon, ĉu necesas traduki la poemon esperanten hodiaŭ, tiam, kiam preskaŭ ĉiuj popoloj de la tero jam povas legi ĝin patrolingve? Jes, tio necesis, ĉar Rustaveli enkorpiĝas ideojn de Esperantismo. “Kavaliro en tigra felo” (vd. bildon de *Sergo Kobuladze*) alvokas popolojn al paca kunlaborado, al frateco,

egalrajteco kaj lukto kontraŭ malbonaj fortoj.

Ĉio komenciĝis en Varsovio, kie juna kartvela studento Giorgi Bakradze havis la honoron persone renkontiĝi kun la granda fondinto de la internacia lingvo, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Tiu ĉi renkonto okazis en la 90-aj jaroj de la deknaŭa jarcento. Giorgi Bakradze petis la aŭtoron de Esperanto enkonduki en la novan lingvon – “Kartvelujo”, ĉar kartveloj tiel nomas sian patrujon. La granda lingvisto konsentis fari tion. Reveninte hejmen, G. Bakradze komencis disvastigi la novan lingvon en Kaŭkazo kaj eĉ fondis revuon – “Kaŭkaza Esperantisto”. Kartveloj, rusoj, armenoj kaj aliaj naciuloj en malnova Tifliso lernadis la lingvon kaj korespondadis kun aliaj samideanoj. Multaj el ili tradukis en Esperanton verkojn de sia nacia literaturo.

Doktoro L.L.Zamenhof persone konis ankaŭ duan kartvelan esperantiston. Tiu estis Giorgi Ciklauri, poeto kaj revoluciulo, kiu en francaj kaj hispanaj revuoj publikigis siajn verkojn en Esperanto kaj subskribis kiel “Tiflisano”. L. L. Zamenhof nomis lin “genia poeto”. Danke al “Tiflisano” la lingvo Esperanto unuafoje renkontiĝis kun Rustaveli. Tio okazis tiel: en la jaro 1887 Kartvelujon vizitis eminenta hungara pentristo Miĥaj Ziĉi, kiu ĉion sciis pri Rustaveli. Ziĉi decidis ilustrati la poemon kaj dum kelkaj jaroj



finplenumis la laboron. Poste li skribis leteron al sia samlandano, hungara poeto Bela Vikar, petante lin traduki la poemon el la kartvela lingvo en la hungaran. Bela Vikar komencis la laboron kaj decidis eklerni la kartvelan lingvon. Li lernis ĝin sed tio estis nesufiĉe. Malfacila aperis la kartvela lingvo de la dekdua jarcento por la hungara tradukisto. En tiu ĉi situacio al la tradukisto helpis la internacia lingvo Esperanto, kiel ponto inter du popoloj, hungaroj kaj kartveloj, kiel peranto inter iliaj literaturoj.

Bela Vikar, per la ĉefo de hungara esperantista klubo, Șandor Gisvein, elvokis el Kartvelujo esperantiston, kiu estis kartvelo kaj memkompreneble komprenis la tekston de la poemo. Tia homo estis Giorgi Ciklauri, kiu volonte alvenis Budapeŝton kaj farinte esperantan sub-linian tekston, helpis al Bela Vikar traduki la kartvelan poemon. Ili ambaŭ multe kaj longe penis, ĉar Bela Vikar devis el la esperanta teksto traduki hungaren la sencon.

Tradukante la poemon, ili renkontiĝis kun specifecon de la mezepoka kartvela lingvo. Tamen Esperanto estas fleksebla kaj perfekta lingvo: oni ĉiam trovas tradukojn de alilingvaj vortoj. Kiel en la originalo, en la tradukita teksto devis rimi finaĵoj de kvar linioj. Por tiu ĉi celo, dum nia laboro, estis necese kompili vortaron de rimoj, kion ni faris survoje. Rimoj en nia traduko ne estas unuspecaj: tuta poemo enhavas adasismojn, purajn rimojn kaj kvazaŭrimojn.

Dum traduko estas uzataj vortoj de kartvela aŭ araba-persa deveno. Estis necese doni klarigojn, ĉar tiaj vortoj ne ekzistas ĝenerale en la lingvo Esperanto. Kompreneble, ili neniam estos propraĵo de la internacia lingvo.

Nun ni prezentas al vi kelkajn strofojn, tradukitajn fare de d-ro (biologio) Zurab Makaŝvili:

P *Kiu kreis universon per potenco ĉiopova,*
r *Tiu de ĉiel' animis la estaĵon per la blovo,*
o *Al ni, homoj li donacis variecon de terglobo,*
i *Kaj deveins de li reĝoj laŭ simile kaj la volo.*
o *Ho, unika plejaltulo, aĵojn faris via mano,*
l *Helpu min potenco via piedpremi la satanon,*
o *Donu al mi la ĝismortan, de miĝnuroj ardan flamon,*
g *Malprezigu terajn pekojn dum la horo de kondamno.*
o *La leono de Tamari dece portas ŝildon, glavon,*
De reĝino sunvizaĝa, kiu havas nigrajn harojn,
Mi kuraĝas ilin glory, esprimante grandan raron,
Sentas ĉiu la dolĉecon, kiu vidas tiun paron.

Gary Miracle Prezentas Sin

Mia forpasinta patrino estis denaska germanino kiu survivis la bombadon de Ŝtutgarto (Germanio). Mia patro ankaŭ parolis flue germane; miaj gepatroj renkontis unu la alian kaj geedziĝis en Germanio en 1957. Kiam mi estis dekdujara, mia familio vivis en Oslo, Norvegio dum unu jaro, kvankam mi memoras malmulte aŭ nenion en la norvega. Dum la somero ni vojaĝis kaj vizitis multe da sur kontinenta Eŭropo. Mi dufoje vojaĝis tien kaj reen por mallongaj periodoj.

Dum du jaroj mi vizitis kursojn de la germana lingvo en mezlernejo, kaj eĉ dum du semestroj en la universitato, sed mi ne laboris tre forte pri tio neniam gajnis flueco. Mi estis ĉiam multe pli interesita en matematiko kaj nature-scienco. Mi fariĝis bakalaŭro en kemio ĉe Miŝigana Ŝtata Universitato kaj d-ro en organika kemio en la Universitato de Viskonsino-Madisono. Ankaŭ mi okupis plurajn instru-poziciojn, lastatempe – docento de kemio ĉe Karl Sandburg Kolegio.

En Januaro 2013 mi legis ion pri Esperanto, kaj ĵus ekfaris iom da esploro en la interreto. Mi trovis la Lernu-retejon kaj komencis pasigi kelkajn horojn semajne farante la retajn kursojn. Ju pli tempo mi pasigis je ĝi, des pli amuza kaj interesa ĝi ŝajnis al mi. Mi nun havas malgrandan kolekton de esperantaj libroj, kaj mi faris malrapidan progreson por legi ilin. Nun mi ŝatus fariĝi flua en la lingvo. Mi trovas ĝin esti interesa defio kaj intelekta hobbio. En la estonteco, mi volus esperantigi sciencajn materialon. –Gary La Mirakla



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
 p/a Randy Ream
 1835 N. Natoma Ave.
 Chicago, IL 60707
 773-262-7738
 www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
 Vicprezidanto – Randy Ream
 Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
 Sekretario – Tina Seastrom
 Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
 Familia membro: \$30,
 Regula: \$20
 Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
 Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Cobbler Square Loft Apts.
1350 N. Wells St., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Junio – Tradicia kluba pikniko 12:00-4:00 en la arbar-rezervejo (forest preserve) de Schiller Woods: norda flanko de Irving Park avenuo kaj okcidenta flanko de Cumberland St. Veturu laŭ Irving Park Ave. ĝis la plej lasta okcidenta haltejo de la buso n-ro 80. Trovu verdan standardon. Prenu viajn ne-E-amikojn, ŝatatajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por vi kaj por via(j) amiko(j). Rostigilo estos je via dispono. Por helpo telefoni al Viktoro: 773-344-2276. Ĝis la revido sur la verda tereno!

28an de Julio – Temo estos anocata.
 *** Atenton! Julia kunsido okazos en malnova loko: Sulzer Library.

28an de Aŭgusto – Partoprenintoj raportas pri la 100-a UK.